



ESPERANTO NORMANDA BULTENO

unuiĝo de la normandaj esperantistoj

TRIMONATA BULTENO. BULLETIN TRIMESTRIEL
de L'UNION des ESPERANTISTES de NORMANDIE

n° 152

VINTRO 1985 / 1986 . (N° 67A NOVA SERIO) .

* REDAKTAS : Annie GAILLARD, 4 rue Louis Jouvét *

* 76800 ST ETIENNE DU ROUVRAY - Tel. 35-65-10-11 *

* *

* Eldonita, ekspedita de : *

* UNION des ESPERANTISTES DE NORMANDIE C.C.P. n° 283 40 H ROUEN *

* *

* KOTIZOJ : Minimuma kotizo : 30 F. Subtena ek de 40 F. *

* Nura abono al Normanda Esperanto Bulteno, sen membreco : 30 F *

* "La verkantoj respondecas pri la enhavo de la subskribitaj *

* artikoloj" *

CONTINUITÉ

Depuis 1947 paraît le " NORMANDA ESPERANTO BULTENO ", date de la création de l'Union des Espérantistes de Normandie.

La rédaction et l'édition de ce bulletin de liaison revient à nouveau au Groupe de Rouen, suite à la décision de notre dernière Assemblée Générale de Domfront (Octobre 1985).

Comme vous pourrez le constater à la lecture, nous adoptons une nouvelle présentation : format réduit (nous avons bien conscience des difficultés rencontrées à la lecture de caractères de petit format, mais il fallait faire le choix entre cette nouvelle formule et l'ancienne : fréquence et dates de parution incertaines, manque de netteté dans l'impression des textes photocopiés ...)

duplication par photocopie chez un imprimeur, par suite :

-1- de l'augmentation constante des tarifs postaux. (même poids de papier, mais plus d'articles à lire).

-2- des difficultés d'édition et de rédaction qu'ont subies les équipes précédentes.

-3- le mauvais fonctionnement de notre machine à photocopier.

A la veille du centenaire de l'ESPERANTO 1887 - 1987, le Groupe de Rouen s'est engagé à une parution régulière (4 numéros par an) à partir de 1986. Pour ce faire envoyez nous vos articles à l'adresse ci-dessus indiquée au plus tard :

- N° 153 (N°68 nouvelle série) pour le 1er Avril, parution fin avril 86.

- N° 154 (N°69) pour le 1er juin, parution fin juin 86.

- N° 155 (N°70) -d°- 1er septembre, parution fin septembre.

- N° 156 (N°71) -d°- 1er décembre, -d°- fin décembre.

sans oublier votre cotisation (abonnement) 1986 : 30,00 F., soutien à partir de 40,00 F. A l'avance merci !

VIVO DE LA GRUPOJ

LE HAVRE

LA ĜENERALA KUNVENO 1985 okazis la 19an de Oktobro, en nia kunvenejo, 11 rue Palfray.

La Prezidanto malfermas la kunsidon je la 17a horo, antaŭ 14 membroj kaj kelkaj simpatiantoj. Li dankas al la komitatanoj pro ties laboro en la nunjara urba manifestacio, kaj al la profesoroj pro ties konstanteco. Li ĝojas gratuli la kvar membrojn kiuj ĉeestis la Universalan Kongreson en Augsburg.

Nia Sekretariino memorigas pri la forpaso de nia amiko Pierre BRIET, lerninto de Esperanto antaŭ la milito, kaj membro de nia grupo de post 1967. Ŝi poste raportas pri la ĵus pasinta agado-jaro :

KURSOJ : S-ro A. Chalm daŭre respondecas pri la konversaciaj kursoj en la Liceo Porte Océane, kaj regule deĵoras ĉe la Junulara Kulturdomo.

S-ro Mary gvidis perfektigan kurson ĉe la Naturamikoj, same kiel S-ino Sery por sia lernantino.

Nia teamo zorgas je okaza perkoresponda kurso por la personoj al kiuj ne eblas viziti la kursojn.

MONATAJ KUNVENOJ :

Pluraj membroj prezentis originalajn paroladojn ; la planita programo estas antaŭ-komunikita al la publiko aŭ afiŝita en la Ejo ; tiuj kiuj ne povas veni partoprenas sendante sian opinion perletere.

KOMUNAJ VESPERMANĜOJ :

La partoprenintoj de tiuj post-kunvenaj renkontiĝoj ŝatus ke ili okazu pli ofte kaj regule.

.../...

.../...

MANIFESTACIOJ :

La triparta kunveno de Ĝemelitaj urboj ne povis okazi. Ni multe dankas al S-ino Peltier pro ŝiaj klopodoj ĉe la urbestro. En la kadro de tiu okazaĵo, ni havis ekspozician budon dum du tagoj ĉe la forumo Niemejer : ni kontaktis la publikon ; individuaj petoj estis registrataj kaj ni proponas al la interesatoj kurson post la somera senaktiveco ; aliflanke, asocioj perletere petis informon pri la Internacia Lingvo.

RENKONTOJ :

Usona paro, korespondanto de A.Chalm, trapasis unu semajnon en nia urbo : tiuj Samideanoj traserĉas spurojn de siaj normandaj pra-avoj, fondintoj de Goderville. Membroj de la Grupo helpis ilin ĉe la urbaj oficejoj, kaj aliaj vizitigis al ili la urbon Fécamp (Branda firmao) kaj la urbojn de la marbordo (Honfleur, Trouville, Deauville).

Kvar membroj partoprenis la Internacian Kongreson en Aŭgsburgo, kie ili retrovis niajn grupamikojn el Sotono, kaj ekkontaktis ĉinajn E-istojn.

Ok Havranoj vizitis la Normandan Kongreson en Domfront.

GAZETARO :

En Le Havre, oni regule publikigas niajn monatajn alvorkojn kaj informojn.

El Aŭgsburgo ni sendis specialan artikolon kies apero favore impresis.

Aliparte la nomo de nia Grupo estas legebla en kelkaj informlibretoj pri la vivo de nia urbo, ekzemple en la Gvidlibro pri libertempoj ; ni provas nun pasigi artikolojn en la urba magazino.

La **KONTOJ** estas prezentataj de nia Kasistino : kiel antaŭvidite pasintjare, tiuj-ĉi prezentus monperdon se ni ne ĝuus malavaraĵajn donacojn. Tiu perdo reprezentas ĝuste la kostojn de la Ejo. Traktadoj okazas nun por ekvilibrigi nian kvoton de partopreno. La Grupkomitato proponas pli-altiĝon de la kotizo al 50 Ff kaj reaktualigon de la vendo de kartoj "Amiko de Esperanto".

.../...

KELKAJ PROVERBOJ :

- Printempo semas, aŭtuno rikoltas.
- Pli gravas amiko, ol mona fabriko.
- Ripetado estas plej bona lernado.
- Eĉ guto malgranda konstante frapante, traboras la monton granitan.
- *Konado de provenkoj estas necesa por la perfekta konado de la lingvo*

ZAMENHOF.

.../...

BALOTADO : La malnova Komitato senŝanĝe re-elektiĝis ; la prezidanto memorigas ke li deziras demisii. Sekve la trejnado de novaj postenuloj por renovigo de la estraro estas nepre necesa.

La Ĝenerala Kunveno 1985 finiĝas je la 19a horo.

Poste ni rendevuas ĉe restoracio por la Stomaka-Kunveno : malfeliĉaj estas tiuj kiuj ne povis veni !

MONATAJ KUNVENOJ : programo de la venontaj paroladetoj

Novembro : La piedirantaj vojoj (J. Gibaux)

Decembro : La marĝenuloj (Silvia)

Januaro : Teo (S-ino L. Caron)

Februaro : Muziko (M. Huet)

Marto : Kulturataj kaj sovaĝaj floroj (Iveta)

Aprilo : Kamparaj feri-loĝejoj (S-ino C. Huet)

Majo : Kio interesas min (S-ino J. Sery)

Junio : indikota

Jean Gibaux

BAYEUX

Komence de Oktobro, en Ouest-France kaj en loka gazeto, mi aperigis artilolon pri nova kurso de Esperanto ĉiun lundon de 20.30 ĝis 21.30.

Mi ankaŭ partoprenis ekspozicion pri Bayeux-aj asociiĝoj kaj metis jubilean afiŝon en la urba biblioteko.

Malgraŭ tio neniu venis al la kurso.

Miaj antaŭaj lernantoj aŭ nun studas en la universitato en Caen aŭ ne plu interesiĝas pri la internacia lingvo. Tial mi forlasis la varbadon en Bayeux kaj nun mi zorgas nur pri vendado de UFE-aj verdaj broŝuroj, esperantaj poŝtkartoj, Tinĉjo (mi aĉetis 25 ekz. ; se vi volas unu mi vendas ĝin po 32 F ĝis 3 ekz. kaj po 30 F ekde 4 ekz.) sur strata foirejo en Caen kaj en la universitata restoracio ankaŭ en Caen.

.../...

.../...

Nur la poŝtkartojn, eldonatajn de Renna Esperanto Klubo, mi facile vendas (jam pli ol 100 dum 3 semajnoj) sed Tinĉjo multe allogas la scivolemon de la publiko ! (daŭrigota)

La prezidanto, la kasisto, la sekretario
kaj la nura membro
de la eĉ neoficialigita asocio Bayeux-Esperanto

Claude Rouget

VIRE

Mi parolis dufoje pri Esperanto ĉe la loka radia-stacio : Vire F. Mo (atingo-povo 30 kilometroj). Lastfoje estis en januaro, laŭ instigo de S-ro Bihel, lica profesoro, kiu probable fariĝis esperantisto.

Antaŭ kelka tempo, la estro de la Turisma Asocio petis ke mi verku esperantan teksteton por la faldfolio pri Vire. Antaŭe, ekde 1972 (Federacia Kongreso en Vire), dum pluraj jaroj, la faldfolio surhavis esperantan teksteton.

De tempo al tempo, mi sendas esperantaĵojn (revuojn, Verdan Broŝureton) al Afrikaj Esperantistoj.

De tempo al tempo, mi aperigas artikoletojn pri Esperanto en la regiona semajngazeto "Le Bocage Libre". Bedaŭrinde ili ofte estas mallongigitaj, eĉ ŝanĝitaj.

Tamen antaŭ nelonge gazetistino de alia regiona semajna gazeto "La Voix. Le Bocage" vizitis min kaj publikigis sur la gazeto ampleksan artikolon pri Esperanto. Jen estas la artikolo. Bedaŭrinde ĝis nun la reago de la publiko estis nula.

Mia bofilo, S-ro Badré, sidanta apud mi, partoprenis en la Universala Kongreso en Aŭgsburgo. En 1984, li partoprenis ankaŭ en la kongresoj en Montrealo kaj Vankuvero.

S-ro Legrat

ROUEN

Je tiu dato la Grupo Esperanto Ruena Regiono (G.E.R.R.) havas 48 membrojn ; nia asocio iom post iom kreskas.

KURSOJ : Ĉi-jare estas kursoj en MJC Rouen rive gauche merkrede kaj en Amicale Laïque Bastié Calmette Salengro de Grand-Quevilly jaŭde (kvar lernantoj en ĉiu). De nelonga tempo nova kurso estis malfermita en CES Alain de Maromme kun 18 gelnantoj. Plie tri lernantoj sekvas nian perkorespondan kurson.

INFORMILOJ - INFORMADO :

* Ĉi-jare la G.E.R.R. eldonis faldfolion (pri Esperanto kompreneble) ; vi trovos ĝin fine de la bulteno.

* Naŭpanela ekspozicio jam estas preta. Ĝi enhavas ĉiujn tekstojn de la faldfolio kun fotoj, dokumentoj. Ĝi jam sufiĉe bone vojaĝis. Vi eble povis vidi ĝin en la Ĝenerala Kunveno de UNE en Domfront la 5an de Oktobro. Poste ĝi estis en "Maison des Amicales" en Grand-Quevilly de la 8an ĝis la 12an de Oktobro, en "Centre Socio-Culturel" ĉiam en Grand-Quevilly de la 18an ĝis la 25a de Oktobro, en "Lycée Camille St Saëns" de la 19a de Novembro ĝis la 3a de Decembro.

* Du prelegoj okazis en Collège Alain de Maromme kaj en Lycée Camille St Saëns en Rouen.

* Radio-elsendoj estis du ĉi-jare ĉe Radio FMR kaj ankaŭ ĉe Radio Diffusion en Septembro.

* Artikoloj aperis en la lokaj gazetoj "Paris Normandie" kaj en "Le Signal" (Grand-Quevilly).

* Kontaktoj ekzistas ankaŭ kun la Centro de Studoj pri Lingvoj de CEPPIC ("Centre de Perfectionnement de la Chambre de Commerce et d'Industrie de Rouen").

DIVERSAĴOJ :

* Okazis en Julio en Rouen vizito de Japana Esperantisto kun siaj du korespondantoj kiuj post la vizito prezentis diapozitivojn pri Japanio.

* Nia grupo, UNE kaj la Normanda Federacio de UFE subvencii lingvan staĝon en La Chaux de Fonds por Pascal Dubourg (Maromme) kiu revenis kun fotoj kaj artikoloj pri tiu loko.

* La 1an de Junio estis festeto honore al S-ro Edgard Jouis honorprezidanto de nia asocio.

TRADUKA RONDO : Novaĵo de tiu jaro, la Grupo starigis tradukan rondon. Ĝi konsistas en tradukado de tekstoj de Esperanto ĝis la franca kaj reciproke. Ĉiu faras sian tradukproponon, venas al la grupaj kunvenoj aŭ sendas sian taskon. Grupe oni verkas korekton kun ofte variantoj kiu estas sendita al tiuj kiuj sendis taskon. Tiu traduka rondo bone funkcias, proksimume 15 personoj cerbumas kaj tiel plibonigas sian lingvokonon.

Se vi deziras partopreni tiun ekzercon, kontaktu la respondeculon : Annie GAILLARD, 4 rue Louis Jouvot
76800 ST ETIENNE DU ROUVRAY

ĜENERALA KUNVENO : Ĝi okazis la 11an de Januaro en la MJC de Rouen Rive Gauche ;

YVETOT

La kursoj rekomenciĝis la 30an de septembro en la junuldomo. Ni esperis starigi novan kurson por komencantoj, sed spite de ekspozicio okazinta la 8an de junio, okaze de la festo de la Asocioj, kaj de bona artikolo farita de ĵurnalistino en "Le Cour-

-rier Cauchois" dum Aŭgusto, neniu kandidato al tiu kurso prezentiĝis. Tamen malfermiĝis duagrada kurso. Ĝi okazas ĉiulunde, de la 18h. ĝis la 19h30 kun 4 lernantoj. La tradicia Reĝkuka Festo okazis dimanĉon 26an de januaro.

Feliĉaj kaj kontentaj estis la samideanoj kiuj partoprenis la ĝeneralan kunvenon en Domfront. Feliĉaj ankaŭ estis niaj geamikoj el Domfront organizintoj de la kunveno ĉar iliaj penoj ne estis vanaj.

Sabate tagmeze, ni regrupiĝis en restoracio kie okazis bankedo kiun honorigis la vicurbestrino, Sinjorino FROTIN. Post tre bona manĝado, ni ekvizitis la urbon gvidate de S-ro SUSONG, urbestrarano, fakulo pri lokaj elfosaĵoj; pro lia kompetenteco, ni estis bone informataj pri la historio de tiu urbeto kies vidindaĵojn ni povis admiri. Surstrate, ni estis surprizataj aŭdi esperantlingvajn kanzonojn per diversaj laŭtparoliloj. Post promonado, la vicurbestrino regaligis nin per honorvino. En la sama salono, la Ruena Grupo starigis sian ekspozicion. Kiam vesperiĝis, ni veturis al PERROU kie ni manĝis, dormis kaj kunvenis en libertempa domo ne tre luksa sed sufiĉe komforta en plena naturo. Post vespermanĝo, ni rigardis filmon pri vojaĝo de Moskvo al Pekino per transsiberia trajno. La komentoj de geamikoj HERVOUET interesis ĉiujn.

Dimanĉe matene, okazis la oficiala kunveno de nia unuiĝo.

Post diskuto, la diversaj raportoj estis aprobitaj. Ni precipe diskutis pri la malfacilaĵoj por aperigi regule nian bultenon. Diversaj proponoj estis faritaj por trovi kontentigan solvon. La Prezidanto alvokis ĉiujn aliĝi la naciajn kaj internaciajn asociojn kaj aboni es- perantajn revuojn. Post elekto, la estraro de nia unuiĝo konsistas nun el plejmulto da gejunuloj.

Nia kunveno finiĝis per tre agrabla promenado tra arbaro kaj ni disiris post komuna trinkado antaŭ bela lageto proksime de Bagnoles de l'Orne.

Ni travivis tre agrablan finsemajnon dank'al niaj Domfrontaj ge-samideanoj kiuj tre bone organizis nian renkontiĝon.

Ili eĉ akiris profiton kiun ili donacis al UNE.

Ni do ĉiuj estu dankemaj kaj gratulemaj al ili.

Petro KIJU (Grand-Quevilly)

NIA KULTURA ANGULO : *Hodiaŭ : niaj koloraj demandoj :*

- (1) : Kiu diferenco estas inter citrono kaj blanka elefanto ?
- (2) : Kio estas nigra, blanka kaj bruema ?
- (3) : Kio estas malgranda, flava kaj tre danĝeriga ?
- (4) : Kio estas flava, flugas kaj pezas unu tunon ?

Nia hodiaŭa proverbo : Nebulo novembro, Kristnasko decembre.

Respondoj en la venonta numero de N.E.B. :::::

 *
 * *ONI ĴEFIS EN IJKO !* *
 *

Ne timu, tiu artikolo ne estas verkita en ido aŭ en iu japana dialekto de Esperanto. Nur temas pri agado de Jefe en IJK...

Kiel bone sciante, okazis internacia junulara kongreso en Eringerfeld de la 22a ĝis la 27a de julio 1985. La temo traktita estis "junulo inter revo, ribelo kaj rezignacio". Diskutrondoj, prelegoj kunigis interesitojn pri multaj aspektoj de tiu grava studobjekto.

Ekzemple, Claude NOURMONT prelegis pri "junulara vivo antaŭ 20 jaroj : la periodo de 1968" ; Kees de Boer prezidis diskutrondon pri anarkiismo, Cvetko MITEVA prezentis lumbildojn pri la bulgara junularo, Rezső BAROSS (hungaro) kaj Daniel DOYE gvidis natur- kaj mediprotektantan grupon, k.t.p.

Sed oni grupiĝis ne nur por diskuti, eĉ mi devas diri ke dum kelkaj partopreniĝ la seriozan programon, la plimulto... ludis (eĉ estis la ĉefa programo dum la sabata posttagmezo) aŭ sportis (naĝado, tabloteniso, dancoj estis proponitaj) aŭ manlaboris (por konstrui kajtojn, makrameaĵojn, plektadaĵojn...) teatris (mi eme spektis la Kalvan Kantistinon de Ionesco) aŭ popoldancis, ekskursis, kafaŭzis, manĝis (vegetarane aŭ ne), babilis, tondigis sian haraĵon, diskotekis, k.t.p.

Dum la internacia vespero, la franclingvanoj fiore (kvazaŭ !) kantis esperantigitajn kanzonojn de B. Vian (la dizertonto) kaj de G. Vigneault (en la grupo kunkantis ano de Kebekio).

Tuj post la kongreso, kvankam multaj preskaŭ ne dormis dum la tuta semajno, 35 geaj kuraĝuloj forlasis la vilaĝon Eringerfeld kaj biciklis proksimume 540 km dum ses tagoj por atingi Augsburg kie okazis la U.K.

Nu ! Mi sentas ke vi nun tre bedaŭras vian neĉeeston en IJK. Ne ploru tamen ĉar ĉiujare iu IJK okazas en la mondo. En 1986 ĝi lokos en Israel kaj en 1987 la lando de Zamenhof akceptas ĝin. Sed finfine, sciu ke la tradicia bicikla karavano kiu vojaĝas de IJK al UK ne estos organizita de BEMI venontjare, pro geografiaj kialoj !

Claude ROUGET (Bayeux)

S-A-L-U-T-O-N-O !

Duafoje okazos en Francio JUNULARA INTERASOCIA RENKONTIĜO, je tieliro. Ĝi lokos en NORMANDIO kaj celas renkontigi lokajn junajn esperantistojn kun eksternormandianoj, konigi al tiuj ĉi-istoj la kamparan regionon de okcidenta Normandio, kaj kunfesti dum printempo.

PROGRAMO:


- vizito al Monto Sankta Mikaelo (unu tuta tago)
- vizito al sovaĝaj insuloj Chausey (unu tuta tago)
- promenadbiciklado tra la kamparo
- promenadrakjardo en la ĉirkaŭaĵoj
- flugado per turisma aviadilo super la Monto Sta Mik:
- vizito de lokaj cidristoj, "calvados" fabrikistoj ...
- vizito de fiskaptista ŝipo

Kaj ankaŭ popolandcoj, ludvesperoj, nokta migrado laŭ la maro, muziko, lumbildoj sportluadoj ktp.

LOKO:

En VAINS, vilaĝeto inter Avranches kaj Granville

Trajno alvenas al Avranches
 Busoj veturas al Vains (5km)
 Vi loĝos en bela domo en
 arbara parko, kiu apartenas
 al edukasocio. Estas bone
 ekipita kuirejo kie ni mem
 kuiritos; do ne forgesu vian
 kuiritreceptan libron !



REMUES 60km

PARIS
300km

PLIAJ PRAKTIKAJ DETALOJ SUR VIA KONFIRMILLO

KROMPROGRAMO:

-Antaŭ la renkontiĝo: de la 1a ĝis la 7a de majo BCMleca biciklado estas organizita de Bayeux al Monto Sankta Mikaelo tra la tipaj normandaj pejzaĝoj. Proks. 250 km en 4 tagoj. Vi pagos surloke, kostos maks. 200 FF, ni mem zorgos pri la manĝoj kaj la dormoblecoj.

-Post la 11a de majo eblos gastoj de normandaj aŭ bretonaj esperantistoj.

ALIKONTIĜO:

ago je la 1a de majo	aligo ĝis 06/03/01	poste
ĝis 20 jaroj	220 FF	270 FF
21-25 jaroj	260 FF	310 FF
pli ol 25 j.	300 FF	350 FF

EKSTERLANDANUJ Quas rabaton je 50 FF se ili aliĝas antaŭ la 15a de aprilo

Unutage partopreno: prezo : 4.

KROMPROGRAMO:

- luado de biciklo: 25 FF/tago
- vizito al insuloj Chausey: 60 FF por la ŝipveturo
- aviadflugado super la Monto Sta Mik: 60 FF por 1 h
- ĉevalrajdo : 60 FF por 1 hora

NE ESTAS KALKULITAJ EN LA ALIKONTIĜO. Vi elektu en tiuj pliaj eblecoj tiujn kiuj plaĉas al vi. Kompreneble, vi rajtas elekti ĝion (estas malsamaj tagoj) aŭ nenion.

Ĝiukaze la programo restas tre abunda, ĉu ne ??



Familia nomo:..... Naskigdato:.....
 Persona nomo:..... Sekso:.....
 Adreso:..... Telefonon:.....

Mi aliĝas al la dua Junulara Interasocia Renkontiĝo kiu okazos de la 7a ĝis la 11a de majo 86 en Normandio.

Mi venos: bicikle trajne aŭte petveturante

Mi scias ke la manĝoj estos ĉefe vegetaraj

Mi deziras havi kun mia konfirmilo la adresojn de samregionaj partoprenantoj jes ne

Mi aparte pagas por: luj biciklon vizito al la insuloj
 aviadilflugado ĉevalrajdo

Mi deziras partopreni la bicikladon antaŭ la JIR kaj mi

deziras la apartan flugfolion pri ĝi jes ne

Mi ŝatus restadi postetagojn ĉe esperantistoj en Normandio Bretonio

(forstrekj la nevalidajn)

Dato Subskribo

PAGO:

Sendu viajn aliĝilon kaj antaŭpagon (minimume 100 FF) al:

① 31 21 37 00

Claude ROUGET

Ecole Louise Laurent


F- 14400 BAYEUX

pkk 3429 92 W ROUEN je la nomo Claude ROUGET

Se vi rezignas pri via partopreno antaŭ 86/03/01, ni redonas vian tutan pagon minus 20 FF, antaŭ 86/04/15 ni konservas 50 FF poste ni repagas nenion!

de la 7a
 ĝis la 11a
 de Majo 86

SAT & JEFO
 invitas vin



ĉe la Monto Sankta Mikaelo

 * REMEMOROJ PRI LA 70a U.K. *

En viaj gazetoj, vi certe jam ! mejo.

legis artikolojn pri la 70a Univer- ! La vasta moderna kongresejo tre
 sala Kongreso kiu okazis en Aŭgs- ! taŭgis. La akceptejo bone provizita
 burgo (Germanio) de la 3a ĝis la ! de ripozseĝoj, manĝaĵoj kaj trinka-
 10a de Aŭgusto. Plian neutilan ra- ! ĵoj permesis restadi surloke la tu-
 porton mi do ne intencas fari sed ! tan tagon kaj ĉeesti la deziratajn
 nur kelkvorte raporti kelkajn kro- ! programerojn. Pro la alta prezo de
 majn proprajn spertojn kaj traviva- ! tiuj manĝaĵoj, ni kaj multaj aliaj
 ĵojn kiuj ĉiam enlasas neforgese- ! plurfoje kunprenis sandviĉojn.
 blajn impresojn. ! La plej enradikiĝinta rememoro

En la listo de la 2300 partopre- ! estas por mi la Tago de la Paco.
 nantoj, mi nombris almenaŭ 11 nor- ! Organizata de la Japanoj por la 40a
 mandojn. Neniam mi renkontis tiom ! memortago de Hiroŝima estis propo-
 da samregionuloj en U.K. . Tion ni ! nitaj al la kongresanoj teatraĵoj
 ni ŝuldas al la proksimeco de la ! (Kretocircolo, la Ludo de Paco), ka-
 kongresurbo, ankaŭ verŝajne al la ! baredaĵoj (La Pinto), publika kun-
 kreskado de la intereso al la U.E.A' ! sido kaj diversaj ekspozicioj (fo-
 laboro. ! toj, leteroj de postvivantoj). La

La vetero montriĝis preskaŭ nor- ! Tago de la Lernejo kaj la Virina
 manda : varma dum la unuaj tagoj, ! Tago ne tiel reliefe elstaris. Pro
 ĝi finsemajne fariĝis pluvega. Sa- ! sia granda sukceso povas esti ke
 me kiel ĉirkaŭ 40 aliaj familioj ! la Tago de la Paco foriĝos konstan-
 ni restadis en tendumejo. Responde- ! ta programero en la estontaj U.K.
 culo de la L.K.K. rezervis apartan ! En la akceptejo staris la multe
 angulon, do ni surloke havis "inter- ! vizitata budo de la venonta U.K. en
 nacia kongreseton" ĉar multaj ali- ! Pekino. Ĉinoj afable respondis al
 landanoj ĉeestis. La babilemo bone ! la demandantoj. Ili vekis grandan
 funkciis, kelkfoje ĝis malfrua horo ! intereson, kolektis kontentigan nom-
 en la nokto. Ĉiutage ni frontis ! bron da partoprenantoj. Plurfoje mi
 kontraŭ saman problemon : kiel tro- ! babilis kun ili. Ne ĉiu-tage ni ha-
 vi kaj retrovi ĝustan vojon al la ! vas okazon interparoli kun Ĉinoj,
 kongresejo ! 10 kilometrojn en mal- ! ĉu ne ?

facile trairebla urbo ! Mi plurfoje ! Ne kutima amasiĝo de tiom multe
 nokte perdiĝis kaj bedaŭris la nees- ! da fremduloj vekis la atenton de po-
 ton de publikaj busoj al la tendu- ! licistoj, kiuj plurfoje diskrete vi-

.../...

-zitis la lokojn serĉante ... ion. ' respondantoj, amikoj, novaj kona-
 Ĉu bombon ? Kun niaj kunvojaĝantoj ! ' tuloj fariĝas familia rondo, kiun
 geSroj Laumonier, ni provis kolek- ' oni malgaje forlases. Kaj nun ?
 ti subskribojn de foraj samideanoj ' Oni ne povas ne pripensi la sekvon-
 sur mondmapo por nia klubejo. Mal- ' tajn U.K.ojn : Pekino (1986), Var-
 facila tasko ! sed ni sufiĉe bone ' sovio (1987 por la Centjara Jubi-
 sukcesis. leo).

Renkontoj kaj personaj kontak- ' Luliĝi en espero estas permesite.
 toj pliĝojigas tian kunvenon. Ko- '

F. TAILPIED (Trouville)

EKZAMENOJ

*Laŭ la informo de la Franca Esperanto-Instituto, sukcesis
 la ekzamenojn :*

ATESTO PRI LERNADO : DUBOURG Pascal (B)

ATESTO PRI PRAKTIKA LERNADO : DUBOURG Pascal (SB)

MENUGE Michel (SB)

*Gnatulon al la sukcesintoj kaj al la sindonaj kursgvidantoj.
 Espereble, venontjare, sin prezentos pli da kandidatoj, ĉefe de la
 A. pri Kapableco.*

DEPLIANT D'INFORMATION : " ET SI NOUS PARLIONS L'ESPERANTO ... "

Vous trouverez ci-joint un dépliant informatif sur l'E°. Édité par le Groupe E°. de la Région Rouennaise. Sur le dernier volet, un emplacement a été réservé pour apposer le cachet de toute association locale, régionale, nationale, spécialisée d'E°, ou l'adresse de tout espérantiste isolé, voulant contribuer à la diffusion de la Langue Internationale. Même si ce dernier n'organise pas lui même de cours oral, par correspondance etc..., il pourra par la suite informer utilement les personnes intéressées par l'étude de la langue, en indiquant les adresses des associations locales, régionales et nationales qui organisent ces activités. Ce dépliant est disponible par quantité au :

GROUPE ESPÉRANTO RÉGION ROUENNAISE, 43 RUE DESSEAUX 76100 ROUEN.
 TEL. 35.72.71.17; C.C.P. ROUEN N°27.70.32.A.

50 exemplaires	= 17,50 F. + 6,50 F. (Frais d'envoi par la poste;).
100 -d°-	= 33,00 F. + 9,50 F. (-d°-)
300 -d°-	= 96,00 F. + 19,60 F. (-d°-)
500 -d°-	= 155,00 F. + 25,30 F. (-d°-)
1000 -d°-	= 300,00 F. + 35,30 F. ()

Kotizo por JEFO kaj UFE : 185 F (vi ricevas "JEFO informas", "Koncize"
kaj "Franca Esperantisto")

[illegible]

14400 BAYEUX Tel. 31.21.37.00.

.../... Kursgvidantoj, asociaj prezidantoj, "ŝlosilaj personoj", k.a; se vi konas ĝejnulojn, kiuj lernas Esperanton, ĉu eĉ nur interesiĝas pri la lingvo, bonvolu sendi al mi iliajn adresojn kaj nomojn. Ankaŭ vi povas doni al ili mian adreson kaj telefonnumeron.

Jamajn gratulojn al Sro Lemachand kiu sendis al mi, tuj post la ĝenerala asembleo de U.N.E. la liston de la malpli ol 30 jaroj kiuj membras en la Grupo de la Ruena Regiono.

Claude ROUGET (Bayeux).

5a SEJNA ESPERANTO-RENDEVUO

Ĝi okazos ekde la 11a ĝis la 14a de aprilo 86a, en Centro Yvonne Martinot, Mesnil Saint Père, apud Troyes (Departemento Aube)

Sabaton posttagmeze kaj dimanĉon matene disvolviĝos kvar paralelaj studgrupoj por komencantoj, progresantoj, fluaĵ parolantoj. Gvidos la kursojn Pierre Babin kaj Joël Laporte, prelegos Giorgio Silfer pri literaturo kaj Ivo Durwaël pri spikologio. Dum la vespero, TESPAS prezentos spektaklon. La aranĝo antaŭvidas ekzamenan sesion de FEI kaj ekskurson en la ĉirkaŭaĵoj.

La Rendevuo estas organizata de Societo Yvonne Martinot franca filio de Literatura Foiro-Kooperativo, kunlabore kun Esperantista Centro Aube. Pliaĵ sciigoj al : Suzanne BOUROT

15 B, rue Morel-Payen
10000 T R O Y E S.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiutandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

KULTURAJ ARANĜOJ 1986A.

29/3 - 2/4 : PEDAGOGIA SEMINARIO :
Didaktiko de lingvo-instruado, ins-

-trudo specifa al Esperanto, metodoj. Seminario organizita de U.F.E.

30/3 - 5/4 : INTERNACIA RENKONTO de INFANOJ : Kursoj, redaktado de stafa gazeto, komunaj promenadoj, ekskursoj kaj distraĵoj.

15/6 - 29/6 : INTERNACIA RENKONTO : kursoj, konversacioj, komunaj promenadoj, ekskursoj, distraĵ vesperoj.

29/6 - 20/7 : PRELEGOJ kaj KURSOJ : prelegoj, konversacioj, kursoj por internacia lernantaro, ekskursoj, distraĵ vesperoj.

21/7 - 10/8 : KURSOJ : por internacia lernantaro, konversacioj, Ktp.

10/8 - 23/8 : INFORMATIKO per E^o. : informatikaj kursoj, E^o-kursoj,

17/8 - 31/8 : RENKONTO de BLINDAJ ESPERANTISTOJ : komunaj aranĝoj, kursoj, trejnado al traduko, promenadoj, konversacioj.

KULTURA ESPERANTO-DOMO. GRÉSILLON - 49150 BAUGÉ. TEL. : 41.89.10.34.

oooooooooooooooooooooooooooo
 o PASPORTA SERVO DE T.E.J.O. o
 ooooooooooooooooooooooooooooo

La Pasporta Servo estas internacia gastiga servo. Ĝia celo estas faciligi la internacian vojaĝadon donante al la uzantoj la eblecon gastigi ĉe esperantistoj. Ĉiujare aperas la listo de gastigantoj, ĉe kiuj la vojaĝantoj povas, ĉu senpage ĉu kontraŭ malgranda kompenso, tranokti dum kelkaj tagoj aŭ pli (laŭ interkonsento).

Rajtas uzi la servon nur la personoj kiu parolas Esperanton kaj pagis la aliĝkotizon. La vojaĝanto rajtas alveni ĉe gastiganto nur kiam li ricevis leteran aŭ telefonan konsenton de la gastiganto.

La reto pli kaj pli densiĝas, sed en Normandio ankoraŭ estas tre malmultaj gastigantoj. Ni bezonas volontulojn por akcepti la eksterlandanajn samideanojn.

Eble ankaŭ vi ŝatus gastigi eksterlandanojn en 1986... Estas multaj valoraj motivoj por fariĝi gastiganto :

Vi helpas la vojaĝantajn Esperantistojn, kiuj eble siavice iam gastigos vin en sia hejmo.

Vi havos okazojn praktiki la lingvon kaj ekkoni fremdajn kulturojn sen forlasi vian hejmon !

Kutime la gastoj volonte akceptas viziti la lokan grupon kaj la kursojn. Tio tre stimulas la lernantojn plulerni kaj la grupanojn plupraktiki la lingvon.

Viaj samurbanoj tiam renkontos praktike la lingvan problemon kaj vidos kiel facile Esperanto solvas ĝin. Tio tre helpas al varbado.

Ĉiu gastiganto ricevas senpage la liston de gastigantoj kaj la rajton uzi la servon.

OO, NE PLU HEZITU !

Internaciigu vian hejmon kaj fariĝu gastiganto de PASPORTA SERVO !
 Kiel ? Vi nur bezonas plenigi la aliĝilon kaj sendi ĝin

al :

Daniel REYNAUD * 6, rue de la Haute-Croix * 45800 SAINT JEAN DE BRAYE

PASPORTA SERVO :**17**

Familia Nomo : (Sro, Sino) Persona Nomo.....
 Adreso :

 Telefonnumero Naskiĝojaro
 La urbo havas enloĝ. kaj esp-ist. Ĝi situas km de
 Mi ofertas senpagan gastigon al Esperanto-parolantoj laŭ la jenaj kondiĉoj :
 Nombro de gastoj Nombro de tagoj Aliaj kondiĉoj aŭ precizigoj :
 Skriba peto. Telefona peto. Sen antaŭa peto.
 Dato : Subskribo.....

JARAJ ABONOJ KOTIZOJ

* **UNION FRANÇAISE POUR L'ESPERANTO** : 4 bis rue de la Cerisaie 75004 Paris
 C.C.P. 855.35.D Paris.

Moins de 26 ans Plus de 26 ans

Adhésion à l'U.F.E.

* Membre simple	70,00 F.	70,00 F.
* Membre abonné (Franca Esperant.)	185,00 F.	185,00 F.
* Membre "conjoint"		85,00 F.

Adhésion à l'U.F.E. + U.E.A.

* Membro kun <u>gvidlibro</u> .	215,00 F.	215,00 F.
* Membro kun <u>jarlibro</u> + <u>Kontakto</u> por - 26j.	261,00 F.	261,00 F.
* Membro kun <u>jarlibro</u> + <u>E^o-Revuo</u> + <u>Kontakto</u> por - 26j.	375,00 F.	375,00 F.

(Gejunuloj malpli ol 26j. krome ricevas "Koncize" + "LEO Informas".)

- Abono al "El Popola Ĉinio" : 1 jaro : 90,00 F.
 2 jaroj : 150,00 F.
 3 jaroj : 210,00 F.

- Abono al "Monato" : 150,00 F. - "Jaro"-libreto : 19,00 F.

* **SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA** : 67 avenue Gambetta 75020 Paris.
 C.C.P. 1234.22.K. Paris.

Kotizo + abono al "Sennaciulo" : 190,00 F. (140,00 F. por senlaboruloj, junuloj, emeritoj;).

Abono al "Sennacieca Revuo" : 32,00 F.

* **SAT - AMIKARO** : 67 avenue Gambetta 75020 Paris.

André Sadier 22 av. P.V. Couturier Bat.N.D. 93000 Bobigny.
 C.C.P. A. Sadier n° 7658.05.C. Paris.

Kotizo + abono al "Sat-amikaro" : 110,00 F. Gejunuloj : (-25j.) 55,00

* **FÉDÉRATION ESPÉRANTISTE DU TRAVAIL** : 179 rue Ordener 75018 Paris.
 C.C.P. : 902.52.F. Paris.

Abonoj al : "Le Travailleur Espérantiste" : 40,00 F.

Bulgara Esperantisto : 20,00 F. Der Esperantist : 28,00 F.

Budapeŝta Informilo : 50,00 F. Paco : 50,00 F.

Internaciisto : Libervola donaco.

CENTRO DE DOKUMENTADO KAJ ESPLORADO PRI LINGVO INTERNACIA

CDELI estis fondita en 1967. Ĝi celas la altnivelajn studojn de la internacilingva fenomeno, kaj ne nur de Esperanto.

En sia konsulta konsultantaro kies prezidantecon transprenis Tazio Carlevaro (poliglota interlingvisto), troviĝis apud Claude Piron (la reprezentanto de Esperanto) ankaŭ André Schild (interlingvano).

CDELI organizas forumojn inter la anoj de la diversaj planlingvaj projektoj. Al la oficejo de CDELI sendas la reprezentanto de ĉiu lingvo broŝurojn, librojn, gazetojn en kaj pri sia planlingvo. Ĝis nun, troviĝas ĉi tie dokumentaro pri ĉirkaŭ 200 lingvoj, en tute 13000 libroj el kiuj 10000 en Esperanto. Ĉi-jare aŭtune eldonos CDELI kalendaron de "BIBLIOGRAFIO DE ESPERANTO", kaj "BIBLIOGRAFIO DE INTERLINGVISTIKO". La eldono estos aŭspiciita de Svisa Nacia Komisiono de UNESCO. Ĝi enlistigos la eldonaĵojn de 1984. Ekde tiam aperos ĉiujare novaj kajeroj rilate al la antaŭa jaro. Por ke tiuj kajeroj estu kompletaj, estu sendata al CDELI por registrado specimenan ekzempleron de ĉio kiu aperis en kaj pri Esperanto, en kaj pri ĉiu alia lingvo, en kaj pri interlingvistiko.

CDELI

BP 5038

CH-2300 LA CHAUX DE FONDS

T : 039..28.46.12

Pascal DUBOURG (Margemme)

(Aŭgusto 1985)

LA DIREKTORO DE LA BIBLIOTEKO : Fernand DONZE

LA PREZIDANTO DE LA CDELI KOMITATO : D-ro Tazio CARLEVARO

LA BIBLIOTEKISTO : Pierre-Yves TISSOT

LA ARKIVISTO : Claude GACOND.

À L'OCCASION DU 100ÈME ANNIVERSAIRE DE
L'ESPERANTO : : : : : UNE NOUVELLE RÉOLUTION
DE L'U.N.E.S.C.O. :



Sofia 1985

General Conference
Twenty-third Session

Conférence générale
Vingt-troisième session

大会
第二十三届会议

Генеральная конференция
Двадцать третья сессия

Conferencia General
23.ª reunión

المؤتمر العام
الدورة الثالثة والعشرون

Résolution XI.4.4.218

Célébration du Centenaire de la création de l'espéranto

La Conférence générale,

Considérant qu'à sa session de 1954, tenue à Montevideo, elle avait, par sa résolution IV.1.4.422-4224, pris note des résultats obtenus au moyen de cette langue internationale qu'est l'espéranto sur le plan des échanges intellectuels internationaux et de la compréhension mutuelle entre les peuples du monde, et reconnu qu'ils allaient dans le sens des objectifs et des idéaux de l'Unesco,

Rappelant que l'espéranto a depuis lors beaucoup progressé en tant qu'instrument de la compréhension mutuelle entre peuples et cultures de pays différents, en pénétrant dans la plupart des régions du monde et la plupart des activités humaines,

Reconnaissant les grandes possibilités qu'offre l'espéranto pour la compréhension internationale et la communication entre peuples de différentes nationalités,

Notant la très importante contribution du mouvement espérantiste, et en particulier de l'Association universelle d'espéranto, à la diffusion d'information sur les activités de l'Unesco, ainsi que sa participation à ces activités,

Eu égard au fait qu'en 1987 sera célébré le centenaire de la création de l'espéranto,

1. **Présente ses félicitations** au mouvement espérantiste à l'occasion de son centième anniversaire;
2. **Prie** le Directeur général de continuer à suivre avec attention le développement de l'espéranto comme moyen d'améliorer la compréhension entre nations et cultures différentes;
3. **Invite** les Etats membres à marquer le centenaire de l'espéranto par des dispositions appropriées, déclarations, émissions spéciales de timbre-poste et autres, et à promouvoir l'introduction d'un programme d'études sur le problème des langues et sur l'espéranto dans leurs écoles et leurs établissements d'enseignement supérieur;
4. **Recommande** aux organisations internationales non-gouvernementales de s'associer à la célébration du centenaire de l'espéranto et d'étudier la possibilité d'utiliser l'espéranto comme moyen de diffuser parmi leurs membres toutes sortes d'informations, y compris sur les activités de l'Unesco.

- * ECOLES : Nous vivons actuellement sur la base d'une décision de Jean Zay, autorisant l'enseignement de l'Esperanto comme matière facultative. (11 octobre 1938.). Dans les lycées et collèges, la place allouée par les Ministères successifs (y compris l'actuel) reste dans le cadre des foyers socio-éducatifs. L'Esperanto est cependant enseigné à l'école primaire dans le cadre normal avec accord de l'Inspecteur d'Académie.
- * PROJETS DE LOI : Plusieurs se sont succédés. Un seul reste encore valable, celui déposé au Sénat par M. Francis Palmero Sénateur et enregistré sous le n° 67 le 4 novembre 1980. Les deux Propositions de Loi déposées par le Groupe Socialiste et Apparentés, dans les périodes récentes à l'Assemblée Nationale (Proposition de Loi n°1667 de mai 1975 et n°1550 du 19 décembre 1979) sont restés jusqu'à présent sans effet, en dépit de l'engagement personnel du Candidat à la Présidence de la République François Mitterrand, le 13 avril 1981, de demander, en cas d'élection, au Gouvernement, de soumettre au Parlement cette dernière Proposition de Loi. Des contacts permanents sont maintenus entre l'Union Française pour l'Esperanto (Association culturelle agréée en 1954 par le Ministère de l'Education Nationale, branche française de l'Association Universelle d'Esperanto, bénéficiant de relations de consultation (catégorie 8) avec l'UNESCO., l'association SAT-Amikaro, et un certain nombre de Députés, Sénateurs et responsables de Partis, pour une actualisation de ce processus.
- * CONSEILS GENERAUX Une série de Conseils Généraux, (de Moselle, de Meurthe et Moselle, du Rhône, du Cher, de Charente, etc...) ont signé au cours des dernières années des résolutions recommandant l'enseignement de l'Esperanto.
- * UNIVERSITES Les Universités de :
CLERMONT FERRAND II (1969) Professeur Pierre Janton, professeur agrégé d'Anglais, auteur du "Que-sais-je" (PUF) n°1511 sur l'"Esperanto".
AIX - MARSEILLE I (1970) Professeur Michel Duc-Goninaz, maître assistant de Russe à l'Institut de Linguistique Générale et d'Etudes Orientales et Slaves, auteur d'un vocabulaire thématique d'Esperanto paru aux Editions Ophrys de Gap.
RENNES II (1982) Professeur André Rannou, maître assistant d'Anglais.
PARIS VIII (Vincennes St Denis) (27 février 1984) Professeur François Lo Jacomo, professeur agrégé de mathématiques et de linguistique, secrétaire de la Société Internationale de Linguistique Fonctionnelle, dispensent un enseignement d'Esperanto intégrable aux programmes de 1er et 2ème cycles (Unité de Valeur).
LYON III et LILLE III offrent des cours d'Esperanto dans le cadre de la Formation Continue.

(*) : Renseignements fournis par :

UNION FRANÇAISE pour l'ESPERANTO, 4 bis rue de la Cerisaie
75004, Paris.

SAT - AMIKARO, 67 avenue Gambetta, 75020, Paris.